



# BULTENO

Organo de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio — (T E Ĵ A)

Julio № 4

Sofio, Bulgario

1957

PREZIDANTO de TEĴA: D-ro F. Szilagy, Mariedalsgatan 9, Borås, Svedio.  
VICPREZID. de TEĴA: N. Kavenius, Niklasenkatu 10/14, Turku 9, Finnlando.  
SEKRETARIO de TEĴA: G. Norgaard Jepsen, Skovvangen, 17, Silkeborg, Danujo.  
KASISTO de TEĴA: Anré Ribot, 11 rue Paul Vergnes, Marmande, Francio.

## SALUTON AL 42-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Post kelkaj tagoj en la bela franca urbo Marseille kolektiĝos pacaj batalantoj el kelkaj dekoj da landoj por partopreni la 42-an Universalan Kongreson de Esperanto. La feliĉaj kongresanoj havos la okazon manifesti ankoraŭfaje al la tuta mondo la supreniron de nia nevenkebla porpaca ideo - per Esperanto kontribui kaj faciligi la interkompreniĝon de la popoloj kaj la pacan kunekzistadon de la ŝtatoj. Ankoraŭfoje la verdstelanoj pruvos la necesecon kaj ĝuos la perfektecon de la genia kreaĵo de nia granda Majstro Zamenhof - la lingvo internacia Esperanto.

Dum la Kongreso oni pridiskutos la ĝisnunan laboron de la Universala Esperanto-Asocio kaj montros la vojojn kaj la rimedojn al plua supreniro de nia nobla Esperanto-movado kaj ideo.

Dum la kongresaj tagoj en Marseille, inter la aliaj fakkunvenoj kaj amuziĝoj, okazos ankaŭ fakkunveno de TEĴA. La ĵurnalistoj-esperantistoj el la tuta mondo, ĉeestontaj ĝin, en amika rondo kaj interkonsento pritraktos la unujaran modestan agadon de nia kara Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, elektos la plej trafajn organizajn formojn kaj agmanierojn por la plifirmigo de TEĴA, por la senpera kunlaborado de la ĵurnalistoj en la tuta mondo.

Salutante elkore la 42-an Universalan Kongreson de Esperanto kaj ĝiajn multnombrajn partoprenantojn ni bondeziras al ili sukcesplenan kaj fruktodonan laboron por la triumfa venko de nia kara Esperanto, por la daŭra paco inter la popoloj.

TEĴA-Bulteno

NIA GRANDA DEVO

Antaŭ dek jaroj, en la belega revuo "Internacia kulturo", kiu speris en Bulgario, mi skribis artikolon, el kiu mi citas tiun frazon:

"La ĵurnalistoj estas iamaniere la esprimantoj de siaj popoloj. Oni kutimas diri pri la gazetaro, ke ĝi estas la kvara potenco en la ŝtato. Do, la ĵurnalistoj havas influon. Kaj se ili estas samtempe esperantistoj, ili devas uzi tiun influon por la diskonigo de nia granda ideo kaj idealo".

Tiuj vortoj validas ankaŭ nun. Oni povas nur aldoni, ke la tasko de la esperanta gazetaro pligrandiĝas nun, kiam la homaro travivas unu el la plej seriozajn periodojn de sia historio. Estas sekreto por neniu, ke lastatempe la internacia politika situacio ne estas bona, ke nia miljara civilizacio estas en danĝero. Ĉiutage, malfermante la gazetojn, oni legas novaĵojn pri la genia eltrovo de la homa cerbo - la nuklea energio.

Sed tiuj elfrovajoj estas dusencaj: bonaj kaj malbonaj. La atomo, tiu mikroskopa korpeto, povus esti bona amiko de l' homo, sed samtempe ĝi povus esti ankaŭ lia plej terura malamiko. Ĝi estas ilo dutranĉa. Ni, la ĵurnalistoj, kaj ĝenerale la intelektuloj, pli ol la aliaj homoj, povas antaŭvidi la teruregajn sekvojn de atoma milito. Ja en la momento ni vidas la terurajn postsekvojn de la eksperimentoj per la nukleaj atombomboj. Despli, milionoble pli terura estus unu atoma mondmilito.

Cetere, ni havas la grandan devon esti en la unuaj vicoj de la batalantoj kontraŭ tiuj, kiuj volas deturni la atomenergion el ĝia pacema rolo. Inter ni - la ĵurnalistoj estas diversnaciaj kaj diversopiniaj homoj el politika vidpunkto. Niaj konceptoj povas esti malsamaj, sed sur la vojo de la batalo, kies celo estas savi la civilizacion de atombombaj eksperimentoj kaj de la atoma milito, ni devas esti streĉe unuigitaj!

Kaj ni kapablas fari multon. Tio ne estu nur vortoj! Ni povas influi la publikan opinion, senĉese montrante al ĝi la grandan danĝeron, kiu prezentas por ĉiuj popoloj la atoma kaj la hidrogena bombo. Ni povas kaj devas revivigi en la memoron de la civitanoj la terurajn tagojn de Hiroŝima kaj Nagasaki; ni povas popularigi argumentojn de la scienculoj pri la neimageblaj sekvoj de eventuala atoma milito; ni povas kaj devas mobilizi la homamasojn kontraŭ la eksperimentado per la terurega armilo k.t.p.

Ni, la ĵurnalistoj - esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo, devas interrilati senĉese, ni devas laŭeble viziti unu la alian, ni devas kongresi ĉiujare neforgesante, ke ni tenas en niaj manoj la rimedon, per kiu ni povas kontribui spontane al la efektivigo de la revo de nia majstro pri interpopola amikeco kaj reciproka kunekzisto.

Ni eklaboru streĉe, per ĉiuj niaj fortoj, kontraŭ la eksperimentoj per atombomboj, kontraŭ la atombomb<sup>a</sup> mondmilito.

Jen estas nia nobla, humaneca devo.

Ŝ t e f a n F r e a m a t  
Bukureŝto - Rumanio

ALVOKO AL LA JURNALISTOJ EN LA TUTA MONDO

Ne tiel facile estas restarigi asocion, kiu iam dormis. Tia estas la stato ankaŭ koncerne al nia Esperantista ĵurnalista asocio, kiun mi dum la kongreso en Kopenhago decidis restarigi kaj reaktivigi, ĉar ni spertis en nia laboro kelkajn malfacilaĵojn.

Sed nun, dank'al nia Bulteno, kiun niaj samideanoj kaj kolegoj en Bulgario eldonas por nia Asocio, la movado bone kreskas, sed ne tiel, kiel decas.

En Bulgario ni havas multajn membrojn, kiel ankaŭ en Pollando, kaj niaj samideanoj en Jugoslavio decidis fondi iniciatan komitaton por kolekti membrojn. Tio estas bone, sed nia Asocio atingos sian celon nur tiam, kiam multaj aliaj landoj eklaboros sammaniere.

Necese estas, ke ni trovu membrojn ĉie. Se ni deziros pravigi la nomon de Tutmona Esperantista Ĵurnalista Asocio ni devas klopodi por akiri membrojn ne nur de la Orienteŭropaj landoj, sed ankaŭ el ĉiuj aliaj, ĉar nia Asocio estas absolute neutrala. Tamen, se oni devus agnoski ĝin efektive kiel neutrala asocio, ni senrezerve devas havi membrojn ĉie.

Do, mi apelacias al la ĵurnalistoj kaj la verkistoj en la tuta mondo: anoncu vin tuj ĉe la estraranoj, ĉe la landaj reprezentantoj aŭ ĉe la sekretarioj; eklaboru aktive por trovi aliajn membrojn en viaj landoj!

Bulgario kaj Pollando donis la ekzemplon. Estas via devo aktive eklabori por ke la ceteraj landoj ankaŭ prezentu plurajn membrojn ĉe TEJA.

G. N ö r g a a r d J e p s e n  
TEJA-sekretario  
Skovvangen 17, Danlando

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ

Bulgara Esperantisto - N-ro 1, junio 1957, organo de BEA. Adreso: poškesto 66, Sofia.

Bulteno Gepatra - N-roj . Eldonas W.Brandenburg, Wilhelmst. 38, Münster (W), Germanio, Kotizo libervola.

Bulteno de Esperantista klubo ĉe Osvetova Beseda en Praha 2. Ĉeĥoslovakio. N-ro 47, majo-hunio kaj n-ro 48, julio 1957.

Jugoslavia Esperantisto - organo de JEF, N-roj 2 kaj 3 (februaro kaj marto 1957). Adreso: Miklosiceva 7. Postfako 275, Ljubljana, Jugoslavio.

Svisa Espero - organo de SES, N-ro 2, aprilo 1957. Adreso: Schorenstr. 32, Langenthal, Svisujo.

Belga Esperantisto - organo de RBLE, N-ro 4, aprilo-majo 1957. Adreso: Avenuo De Bruyn, 44 Wilrijk-Antrverpeno, Belgio.

The Worker Esperantist - organo de WEM, N-ro 96. Adreso: 27, Argyle Road, Ilford, Essex, Anglio.

ESPERANTO EN LA NACIA GAZETARO.

Artikolo pri esperanto en grava soveta gazeto

En "Literaturnaja gazeta" (Literatura gazeto), organo de la Estraro de la Asocio de la sovetaĵ verkistoj, n-ro 86 (3,742), 18 julio 1957 j., aperis granda dukolona artikolo "Esperanto - helpa internacia lingvo" sub la rubriko "Ni respondas al demandoj de legantoj".

La leganto E.Sapojnikov el Stalingrad demandas: "Mi multe dezirus legi en la paĝoj de via gazeto pri la internacia lingvo esperanto. Kiel oni devas pritaksi tiun, laŭ mi, interesan aperaĵon en la vivo de la popoloj en la mondo?"

La doktoro de filologiaj sciencoj E.A.Bokarjov, kiu jam aperigis artikolojn pri esperanto en la revuo "Voprosi jazikoznaniĵa (Problemoj de la lingvoscienco)", per konvinkaj vortoj en sia artikolo respondas al la leganto, klarigante la valoron de la internacia lingvo, kontraŭstarante la malkonfidon kaj miskomprenon pri esperanto.

La apero de la artikolo de samideano Bokarjov montras la altintan intereson de multaj homoj en Sovet-Unio pri la internacia lingvo.

EL LA POŝKESTO DE LA SEKRETARIO

Georgo Michalik, Szeroka 17 m.5, Gdansk, Pollando, interalie skribas: Mi ne estas profesia ĵurnalisto, tamen mi ofte skribas artikoletojn por mia faka revuo. Mi estas libroteni-

sto en ŝtata entrepreno, kiu okupiĝas per vendado de libroj; kaj de tempo al tempo mi aperigas informojn pri Esperanto en miaj jurnaloj. Mi volonte deziras interŝanĝi artikoletojn pri vendadformoj de libroj en diversaj landoj. Interŝanĝe mi povas sendi artikoletojn pri pollandaj aferoj.

Walerian Włodarczyk, Warszawa 26, ul. "Swietoslawska 57, Pollando skribas: Mi afable petas kontaktigi min kun la ĵurnalistoj de diversaj landoj, speciale el la ekzotikaj. Mi interesiĝas pri diversaj priskriboj de popolaj festoj, kutimoj, lernejinstruado de infanoj en lernejoj kaj ekster ili, ekskursoj de junularo (sciencaj kaj turistaj) kaj skoltismo. Mi petas konsideri, ke se la materialojn oni sendus kune kun belaspektaj fotoj, ili estos por mi pli valoraj. Mi estas kunlaboranto de junulara gazetaro kaj mi estas preta rekompenci la ricevitajn materialojn per materialoj pri Pollando. Mi ankaŭ estas preta kontraŭ la ricevitaj materialoj sendi al miaj korespondantoj esperantaj eldonadojn el Pollando, se tio povus esti interesa.

Stanisław Rams, Zielona Góra, ul. "Zyty", bl. III 22, Pollando apelas: Mi interesiĝas precipe pri Suda Afriko, Aŭstralio, Suda Ameriko kaj Japanio. La celo de tiuj kontaktoj estas klara: interŝanĝo de artikoloj, informoj, fotobildoj, unuvorte, uzi la lingvon de Zamenhof por praktikaj celoj.

Internacia Turista Asocio, Milano, Parabjago, Str. "L. Zamenhof" 21, sendas karton kun la jena teksto: Notu bone, ke ITA daŭre kolektas amasojn da turistaj reklamprospektoj el la tuta mondo, por disdoni ilin senpage al ĉiuj, kiuj scipovas Esperanton en Italio.

#### LANDAJ REPRESENTANTOJ

Bulgario: Ivan Keremidčiev-Esperov, bul. "Hristo Botev" 98, Sofio, II.

Ĉeĥoslovakio: Jojko Stanek, Osadni 45, Praha 7, Hořovice.

Norvegio: O. Thormodsen, Box 132, Haugesund.

Pollando: Emil Mayer, Florianska 4/3, Krakow.

Rumanio: Stefan Freamat, Str. Gabriel Peri 4, Bukureŝto.

U.S.S.R.: I. Hoves, Poŝtkesto 1004, Moskvo-centro.

Hungario: Marton Lajos, Esperanto, Burs-n 2, Budapeŝto XII.

#### MEMBROJ (daŭrigo)

Joseph Pion, 95 Bl. Henri Barbusse, Val Notre Dame, Sartrouville, (Seto), Francio.

Robert Cuvellier, 259 rue Nationale, Lille, Francio.

Mkrteĵan Simon, Erevan, Sovjet-Armenio, USSR, ul. Cukarsjan 19, kv 5, Sovet-Unio.

Marinko Givoje, Gorni trg 31, Ljubljana, Jugoslavio.  
Vilh. Grahn, Jämtlandsg.86, Vällingby, Svedio.  
Valfrid Görason, Hamarsgata 106, Halmstad, Svedio.  
Lucien Giloteaux, 19 rue de Colmar, Croix (Nord), Francio.  
Sols. Vesterland-Andersen, Box 136, Kopenhago, Danio.  
Stefka Hristova, str. Ivac Vojvoda 14, Sofia, Bulgario.  
Marton Lajos, Esperanto, Burs-u 2. Budapest XII, Hungario.  
Antanas Lobakas, 17 Kranto 15-4, Kaunas-2, Litova SSR, USSR.  
Sterjo Z. Kukušev, s. Belozem, Plovdivsko 2. Bulgario.  
Teodor Danailov, v. "Stârşel" bul. Lenin 47, Sofia, Bulgario.  
Gh. Hochausser-Armony, P.O.B. 5171, Haifa, Israelo.  
Dr. Eadros Megalli, Münschen 8, Schliessfach 133, Gemranio.  
Vesterland Andersen, Box 136, Kopenhago, Danio.  
Kraji Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana, Jugoslavio.  
Boris Grabnar, Gornji trg 15/II, Ljubljana, Jugoslavio.

REDAKCIA POŝTO

Antanas Lobakas, Kaunas, Litova SSR. - Vi regule ricevos la Bultenon de TEJA. TEJA esperas ke ankau vi per via agado kontribuos por la plifirmigo de ĝiaj vicoj kaj agado. Varbu TEJA-anojn kaj abonantojn.

Marton Lajos, Budapest, Hungario. - Vian leteron kaj deziron labori por TEJA ni renkontis kun ĝojo. La grundo en Hungario estas fruktodona kaj ni atendas riĉan rikolton de membroj kaj abonantoj. Sendu la unuan membroliston. Kiel reprezentanto de nia Asocio propagandu la noblan aferon de TEJA.

Oskar Gardi, Taupse, Sovet-Unio. - Vian leteron kaj la presajon ni ricevis. Dankon. Ni ekspedis al vi la ĝis nun aperintajn numerojn de la Bulteno, ankau la deziratan presajon.

A.I. Semenov, Jaroslavl, Sovet-Unio. - Dankon pro la gratuloj. Eklaboru ankau vi por nia afero.

Emil Mayer - Pollando, Matko Dobčnic - Jugoslavio, St. Freemat - Rumanio kaj la ceteraj reprezentantoj kaj agantoj de TEJA estas petatas sendi informojn pri la vivo de la sekcioj kaj anoj de TEJA.

x x x

Al la redakcioj de esperanto-revuoj, ĵurnaloj, gazetoj kaj bultenoj ni sendas nian Bultenon interŝange.

-----  
Redaktoro: I v a n K e r e m i d ŝ i e v  
blv. "Hristo Botev" 98, telef. 3-34-04, Sofia II, Bulgario  
-----